

# Protokolo de la estrarkunsido de la 16a de decembro 2010

## Federacio EDE

Skajpe de la 21a15 ĝis la 23a10

partoprenantoj:

- Bertrand HUGON
- Eŭgen MACKO
- Fabien TSCHUDY

ne ĉeestis:

- Bert SCHUMANN: ne ĉeestis pro privata kialo, antaŭe sendis kasraporton.
- Elisabeth BARBAY : ne ĉeestis pro malsano

## Tagordo

1	Politika programo.....	2
1.1	Taksi la subtenon de la Administra Konsilio pri ĝi.....	2
1.2	Publikigo.....	2
2	Statuto.....	2
3	Raportoj.....	3
3.1	Somera universitato.....	3
4	Ĝenerala Kunveno.....	3
4.1	Financa raporto.....	3
4.2	Morala raporto.....	3
4.3	Nomumo de novaj konsilianoj.....	3
4.4	Baloto de nova estraro.....	3
4.5	Voĉdono pri la politika programo.....	3
4.6	Voĉdono pri statuto.....	3
5	Varbilo.....	3
6	Komuniko pri surrivera transporto.....	3
7	Venonta estrar-skajpumado.....	4

La decidoj blue skribitaj estis voĉdonitaj

# 1 Politika programo

## 1.1 Taksi la subtenon de la Administra Konsilio pri ĝi

Fabien lanĉos la interretan voĉdonon inter la konsilianoj komence de januaro. Li estas libera uzi la voĉdonproceduron, kiun li volas (retpoŝta aŭ per retpaĝoj) sed la afero estu alirebla eĉ por homoj, kiuj ne kutimas uzi interretajn ilojn.

Almenaŭ dek konsilianoj devas subteni la programproponon, por ke ĝi estu submetata al la voĉdono de ĉiuj membroj en nia marta ĝenerala kunveno.

Se tiuj dek subtenoj ne estas atingitaj eblas voĉdonigi pri modifota versio sed ne eblas voĉdonigi konsilion pli ol dufoje pri la afero antaŭ februaro.

Ĉiufoje la konsilianoj disponas je unu semajno por voĉdoni.

## 1.2 Publikigo

Ŝajnas al ni iom tro frue por prezenti la programproponon al la gazetaro, kvankam ni ja bezonas la opinion de ne-esperantistoj pri ĝi. Bertrand prefere ne donu paperan ekzempleron de la programpropono al ĵurnalistoj.

# 2 Statuto

Ni komentas la statut-modif-proponojn de Bertrand enpaĝigitajn de Fabien.

Eŭgen ŝatus, ke en la celo de la Federacio aperu tio, ke ni strebas al lingvaj rajtoj kaj volas protekti la kulturan diversecon. Aŭ almenaŭ ni devas pli emfazi pri tio en la politika programo.

Fabien ŝatus, ke en la tria artikolo aperu ebleco, ke la membroj de la sekcioj partprenu en la ellaborado de la politika programo. Tamen (respondo de Bertrand) laŭ la artikolo 11a modifita jam eblas, ke ili proponu ŝanĝojn ĉar volontuloj difinas la tagordon de la konsilio. Tiuj volontuloj estas grupo lote kolektita inter rektaj membroj kaj membroj de la sekcioj.

Devos okazi diskuto pri la detaloj de la lotado: ĉu « nur unu lotado » por ĉiuj aŭ aparta lotado por ĉiu sekcio (kaj eventuale por rektaj membroj). Ĉar ni devas precizigi tion en la interna regularo.

Cetere, ni (estraro) devos eble revoĉdoni, ĉu rektaj membroj rajtu je reprezentantoj en la administra konsilio. Kiam ni voĉdonis jes en Grezijono ni eble subtaksis la argumenton, ke sen reprezentanto en la Administra Konsilio la rektaj membroj estos pli emaj krei EDE-sekcion en sia lando.

Cetere se ni gardas ilin, kial tri reprezentantoj de la rektaj membroj ? (kaj ne unu ekzemple)

Ĉu aldoni frazon pri la esperantlingva versio de la statuto ?

## **3 Raportoj**

### **3.1 Somera universitato**

Elizabet nun ne havas tempon por esperantlingve resumi la raporton de Marcelle.

## **4 Ĝenerala Kunveno**

La franca sekcio pretas diskonigi inform- kaj voĉdon-materialon al ĉiuj siaj membroj. Ĝi simple ricevu franclingvan A4-folion meze de januaro.

### **4.1 Financa raporto**

Bert sendis ĝin al la estrara listo. Ni nur ne komprenas kial ret-gastigado povis enspezigi al ni 172 eŭrojn. Ĉu kompenso al troa repago ?

### **4.2 Morala raporto**

Ĝi estu mallonga ĉar ĝi devos esti tradukata almenaŭ al la franca.

### **4.3 Nomumo de novaj konsilianoj**

Bertrand sendu retmesaĝon al la prezidantoj de la sekcioj, ke ili nomumu siajn reprezentantojn por la venonta mandato.

### **4.4 Baloto de nova estraro**

Fabien ne certas ĉu li rekandidatos por la estraro, eĉ ne pri la konsilio.

Eŭgen pretas rekandidatiĝi, escepte se jam sufiĉe da kandidatoj.

Bertrand pretas rekandidatiĝi.

### **4.5 Voĉdono pri la politika programo**

### **4.6 Voĉdono pri statuto**

## **5 Varbilo**

Pli bone nun la federacio rezignu pri ĝi ĉar ni fokusu nian agadon por prepari la ĝeneralan kunsidon.

La sekcioj faru siajn propran varbilojn.

## **6 Komunikado pri surrivera transporto**

La komunik-paŝoj proponitaj de Johan Derks por alparoli la instancojn

responsajn pri kunordigado de la surriveraj transportoj ŝajnas al ni seriozaj. Se la neĉeestintoj (Bert kaj Elizabet) ne kontraŭas ni delegas al li la taskon realigi tiujn komunikpaŝojn nome de EDE. Li nur ĉiam sendu al la sekretario kopion de la demandoj kaj respondoj por nia arkivo.

## **7 Venonta estrar-skajpumado**

Mardon, la 25an de decembro je la 21a.